



TEA-BULTENO

1 1^A JARO

JULIO - AŬGUSTO 2008

NUMEROJ 7-8

Riĉiĝu ni reciproke per niaj diversecoj.
Paul Valéry

Mia kara legantaro!

Per laŭtkriado la TB-vendisto klopodas disvendi sian produkton, eĉ en ĉi someraj monatoj, kiam jam ĉies pensoj forkuras galope al sunaj sablaj strandoj, al freŝaj montaj arbaroj, al eksterlandaj mirindaĵoj, kaj tute oni ne havas tempon por legi la 6-folian informilon. Ĉu li sukcesos altiri vian atenton, specife de vi, celanta fine konkretigi tiun tutjaran revadon, nome partopreni en iu kongreso, konferenco, seminario, por pli kleriĝi, por amuziĝi, por kunestadi kun malnova amikaro kaj/aŭ kontakti interesajn homojn, travivi intensajn aventurojn en foraj landoj: ja ebloj vagadi tra la esperantuja mondo tute ne mankas, ĉie ajn okazas io alloga.

Kaj, dum iu el tiuj kunvenoj, jen hazardo jen intenco povus prezenti al vi la ŝancon elkoni la plej diversface-tajn flankojn de la "Esperantisto". Jen kio okazis antaŭ "iom" da tempo al Jean Forge, priskribita en lia verko:

MIA VERDA BREVIERO.

"Pardonu, samideano, ĉu mi rajtas vin peti, ke vi enskribu vin en mian memorlibron?" demandis min maljunulino ŝovante sub mian nazon albuman libron, sur kies kovrilo brilis verda stelo kaj aktuala kongresa glumarko. Ŝi estis malgrasa oldulino kun iom pinta nazo. Ŝiaj ostecaj fingroj foliumis en la libro: "Jen estas bona loko por vi, sed ne forgesu skribi vian plenan adreson. Eble vi havas hazarde malgrandan foton, kiun mi povu englui kiel memoraĵon?"

"Sed mi ja estas tute simpla kongresano," mi protestis, "kaj vi certe kolektas aŭtografojn de gravaj eminentuloj." "Ne, ne," ŝi insistis, "ilin mi jam havas en la libro, rigardu!"

La libro estis plena de diversaj dediĉoj, eĉ poemoj. Multaj fotoj ornamis la skribaĵojn, inter kiuj mi ekkonis la fizionomion de konataj samideanoj. Mi enskribis mian nomon kaj laŭ ŝia peto mi aldonis ian rapide elpensitan poemeron:

Kvankam vin mi ne konas,
tamen subskribon mi donas —
Ĉar amo el via kor' resonas
kaj min je simpatio admonas!

"Ooŭ!" ŝi elkriis admire, "vi estas ja poeto!"

"Vi tro flatas min, sinjorino," mi rediris kaj fingrumante en mia brustopoŝo, mi eltiris pasportan bildeton. Tiun ŝi ĝojigite ekkaptis. Mi supozis, ke nun mi plenumis ŝiajn petojn. Sed, ho ve! Ŝi serĉis en sia mansako kaj eltiris pakajon da ilustritaj poŝtkartoj, kiuj estis jam subskribitaj de multaj samideanoj, ne mankis eĉ arabaj kaj japanaj subskriboj. Dum mi pacience metis mian subskribon (ne forgesu la landon!), ŝi vigle babiladis.

"Mi vizitas de multaj jaroj niajn kongresojn. Hejme mi jam havas memorlibrojn de 20 kongresoj! Post mia morto, tio estas, en mia testamento mi destinis mian bibliotekon por la Esperanto-Muzeo. Mi estis iam instruistino, nun mi havas etan pension. Jes, mi malsatas la tutan jaron ŝparante por kongresa vojaĝo... jes, mi havas riĉajn parencojn, sed ili estas tre avaraj ili opinias ke mi estas esperanta frenezulino, ke mi ĉiam vojaĝas... ke en mia aĝo mi sidu hejme kaj ne vagabondu tra la mondo... jes, tiel ili diras kaj groŝon al mi ne donas, tiuj avaraj kanajloj... kaj mi sendas al ili ĉiam poŝtkartojn... mi scias ke ili koler-furiozas kaj envias min, ricevante tiajn poŝtkartojn... vi komprenas, tio estas mia eta venĝo... hihi, mi ridas pri ili, tiuj enviemuloj, parenco-homaĉoj... ili estas kontraŭ Esperanto, mi estas pro tio tre kontenta, ĉar tiujn aĉajn personojn ni ne bezonas en nia movado, ĉu mi ne pravas?"

La oldulino amuzis min kaj mi invitis ŝin al glaso da vino. Ŝi gaje englutis la ruĝan fluidaĵon kaj plu babilis. "Mi edukas kaj instruas malgrandan dekjaran Evinjon, sciu, ŝi estas mia nepinido, tio estas: filineto de mia nepino... kaj ŝi tre amas min. La gepatroj ne scias, ke ilia Evinjo parolas jam flue Esperanton... mi sekrete instruis ŝin kaj la infano estas tiel saĝa, ke ŝi gardas tiun sekreton... korespondas kun aliaj infanoj de la tuta mondo... imagu nur, kompreneble pere de mia adreso... granda Dio, mi ĉiam timas, ke la gepatroj iutage ekscios la aferon..."

Ŝi volis rakonti al mi pluajn detalojn el sia vivo kaj



Kien iri, por esperantumi???

Al Hispanio, de la 3^a ĝis la 6^a de julio, al Cuenca: kadre de la Internacia Jaro de Lingvoj, la temo estos: “Lingvoj, Trezoro de la Homaro, iloj por Dialogo”. Eminentanta la prelegantaro! Pliajn informojn vi trovos ĉe: www.esperanto.es

Al Hungario, por la Esperanto-Festivalo IRIS, 7-14 julio, en la urbo Szolnok, kiu gastigos la 2^{an} Junularan kaj Plenkreskulan Festivalon kaj la 35^{an} Hungarian E-Kongreson. Informoj: www.iris.esperanto.info.

Al Aŭstrio, por Interregiona Renkontiĝo en Wörgl (11-13 julio): Koncerto de Attila Schimmer, reteja projekto “vivomondo”, jarkunveno de Austria E-Federacio, kaj multo alia. Adreskontakto: aef@esperanto.at

Al Germanio, Herzberg, 12-19 julio, por la 3^a Internacia Konferenco de Naturkuraca Asocio (INA). Temo: “Herbokuracado en Oriento kaj Okcidento”. Inf: ina-asocio@web.de aŭ www.ina-asocio.info/

Aŭ ... **Ĉiuj al Kanado!** por partopreni de la 12^a ĝis la 18^a de julio en la 7^a Tutamerika Kongreso de Esperanto en Montrealo, kies ĉefa temo estos: “Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj - Diverso por daŭripova evoluigo de la Amerikoj”. La urbo Montrealo kaj ties universitato de Kebekio ofertas malmultekostajn loĝejojn; la kongresa temo ebligas prezenti serion da prelegoj, tri- aŭ kvar-tagan “praktikadon”, kun la celo pli konkrete studi kaj komprenigi la problemaron prezentatan, interalie kion ĝi praktike signifas por ni, esperantistoj. Pliajn informojn oni povas trovi ĉe la jena ejo: www.take7.ca



Al Nederlando, 19-26 julio, por festi nian UEA-n okaze de ĝia 100-jariĝo. Temo de la 93^a UK: “Lingvoj, trezoro de la homaro”. Informoj: www.uea.org aŭ info@uea.org

Aŭ **Al Italio**, en Rimini, kie okazos, 30/08-06/09, la Katolika Esperanto-Kongreso, kun temo: *Verbum Domini - La Parolo de Dio* - “Nia politiko: Paroli kaj preĝi” (Paŭlo la 6^a)

priklaĉi sian parencaron, sed subite ŝi interrompis sian babilan torenton, ŝiaj okuloj evidente ion rimarkis. Rapide ŝi eltrinkis sian glason, enpakis la memorlibron kaj poŝtkartojn en sian mansakon kaj dankinte ekrapidis al la terasa ŝtuparo por ĉasi novan viktimon. Ĉar jen — jen vidiĝis la silueto de ekzotika viro kun pajla ĉapelo, sur kiu estis fiksita flirtanta verda flageto...

Nu, nu, tamen interesa sperto, ĉu ne? Do, en septembro mi esperas aŭskulti de vi kelkan interesan historieton rilatan al renkontiĝo kun iu speciala persono, krom admirati, en fotoj kaj bildoj, la mirindaĵojn de la vizititaj lokoj.

Bonan somerumadon al vi ĉiuj kaj ... ĝis la en aŭtuno!

Via Elda

Sed unue **al GROSSETO**, je dek du km de la Tirenara maro, por partopreni en la **75^a Itala Kongreso, de la 22^a ĝis la 29^a de aŭgusto!** Vi ĝuos tre interesajn kongresajn aranĝojn kaj tre ĉarmajn lokojn ĉe la maro, la montetoj, la montaro! Jen kion i.a. proponas la tre varia programo: Inaŭguro, kun la festparolado de Sean O’ Rian, funkciulo ĉe la Eŭropa Unio; solena meso en la katedralo de Grosseto, kun kelkaj kantoj en esperanto; tri seminarioj, gvidotaj de Stano Marček, redaktoro de “Esperanto”, la UEA-revuo, pri Informado; de François Bartsch, vicprezidanto de la Franca Esperanto-Federacio pri Didaktiko, kaj de Claudio Imbrenda pri Esperanto kaj Informadiko. Bazaj kaj progresigaj kursoj; koncerto de la urba koruso “Giacomo Puccini”, kun kelkaj kantoj en esperanto; piedpilka ludado; koncertoj, tute en esperanto, de Gianfranco Molle kaj Piero Nissim; koncerto de la groseta ensemblo *Whisky & Gessato*, kun kelkaj kanzonoj en esperanto; kelkaj legaĵoj el literaturaj verkoj pri Maremo (D. Alighieri, G. Carducci, R. Fucini, M. Pratesi, C. Alvaro, G. Civinini, D.H. Lawrence, ktp); prezento de la romano de Luciano Bianciardi “*La vita agra*”, esperantigita far Carlo Minnaja, kun la partopreno de la tradukinto kaj de Luciana Bianciardi, filino de la verkisto kaj posedantino de la eldonejo *ExCogita* de Milano; ekskurso de Castiglione della Pescaia al la insuloj Giannutri kaj Giglio; kaj pluraj aliaj vizitoj al interesaj lokoj. Por informoj: grosseto2008@esperanto.it kaj <http://italakongreso.esperantoitalia.it>

... sed kien ajn vi decidis iri, kunportu ankaŭ tiun ĉi recepton: ĝi forprenas el via valizo malmulte da spaco! Ĝin enigu en via monujon, en vian mansakon, ĝin metu kune kun via pasporto, ne gravas kie, gravas ke ĉiam ĝi estu kun vi kaj ke, je l’mateniĝo, vi legu kaj strikte sekvu la konsilojn: lernu kiujn ingrediencojn uzi kaj kiel ilin kunmiksi, por ke ĝi fariĝu via ĉiutaga matenmanĝo!



Matenmanĝo por plenfeliĉa tago

Du fingrojn da pacienco enmetu
en bovlon da boneco,
kvar kulerojn plenajn de bonvolo,
pinĉaĵon da espero kaj ...
unu dozon da bonintenco.

Aldonu du manplenojn de toleremo,
iom da singardemo,
kelkajn fadenojn da simpatio,
plenmanon da tiu rara planteto
kiu nomiĝas humileco,
kaj grandkvanton da bonhumoro.

Spicu la tuton kun multe
da sana prudento
kaj ĝin kuiretu je malforta fajro.

Kaj jen havu plej bonan tagon!



Rakontu al mi fabelon...

Du arabaj fabeloj

La luno en la puto

Iun vesperon, virino kune kun sia edzo iris al puto por trinki la azenon. La luno, runde ronda, speguliĝis en la puta akvo. Subite ĝi malaperis, ĉar kovrita de nubeto. La edzino alkriis al la edzo, tute mirigita: "Rigardu, la azeno eltrinkis la lunon!" Tiam la viro ekbategis la kompatindan beston, elkraĉante: "Nu, nu, rapide, elvomu la lunon kiun vi forglutis!" Intertempe tiu nubeto, kaŝinta la

lunon, glitis for kaj la astro reaperis en la puto. Ĝojaj, la geedzoj reiris hejmen, kaj kontentaj, ke ili sukcesis eligi ĝin el la stomako de la azeno.

La avarulo

Estis iam tiom avara viro, kiu al sia edzino donis kiel manĝaĵon nur akvecan supon kaj senkondimentan kuskuson. Se hazarde ĉe li ekvenis gastoj, li kaŝiĝis por ne esti devigita regali ilin per pano kaj mielo, laŭ la lokaj tradicioj.

Iun tagon venis liahejmen la du fratoj de lia edzino, por viziti ŝin. Al ili ŝi plendis kaj rakontis kelkajn epizodojn pri la edza avareco. Ekkoleris la fratoj kaj sekve, akorde kun ŝi, decidis doni neforgeseblan lecionon al tiu avaraĉulo. Tial ili iris al bazaro, aĉetis iun dormigan pulvoretan kaj invitis la edzon por komuna tagmanĝo. Li manĝegis abunde, ĉefe pro la fakto ke ĝi estis senpaga kaj, liaopinie, la regalitaj manĝaĵoj eĉ pli bongustas ol tiuj mem pagitaj! Dume la fratoj ĉee observadis lin. Finmanĝinte, kune ĉiuj reiris hejmen.

Tuj post hejmiĝo, la viro profunde endormiĝis pro la granda kvanto da dormigilo englutita manĝante. Nokte, la du fratoj lin envolvis en blanka littuko, kies ĉiujn flankojn ili kunkudris, lasante nur etan truon je la supro por la kapo: post tio, tiun pakaĵon ili portis al tombejo. Iom poste, kaŭze de malvarmo kaj malkomforta pozicio, la edzo vekigis. Intertempe la du fratoj estis sin maskintaj per bestaj feloj. Bastone, ili superŝutis lin per hajlado da battoj, kio lin vekis komplete: tiam li konsciiĝis esti en tombejo, ene de tombo, kaj, ekvidante la du bestecajn figurojn, konvinkiĝis ke tiuj estis *Munkir* kaj *Nakir*, la du juĝ-angeloj. Tiam li ekĝemis kaj petegis pri indulgo. La du maskitaj uloj komencis rapidritman pridemandadon: "Kiam ajn vi donacis ion al malriĉuloj?" "Kiam ajn vi aĉetis novan veston al via edzino? Kiam vi regalis ŝin per satiga manĝo?" Multis la demandoj kaj ĉiam sama estis la respondo: "Tion mi ne faris! Tion mi ne faris!" La viro, sub tiu pluvado da demandoj, esploris, sed la fratoj eĉ pli forte lin bategis, ĝis kiam li svenis. Je tiu punkto ili reportis lin al lia hejmo kaj rekomendis al la fratino: "Ne faru al vi zorgojn, lasu lin dormi, kaj morgaŭ mate ne vi konstatos, ke li resaniĝis de tiu aĉa malsano: la avareco!"

En la morgaŭo, post vekigado, la edzo iris al la bazaro, plenigis sian provizkorbon per multaj bongustaĵoj kaj per ĉio ajn kio estis bezonata hejme. Al ĉiuj almozpetantoj, renkontintaj survoje, li donacis plurajn monerojn; por la edzino li aĉetis belan veston, kaj fine rehejmiĝis. La edzino eĉ ne povis kredi realaj tiujn delikataĵojn kiujn li alportis.

Feliĉa estis tiu edzino pro la neatendita transformiĝo de la edzo, kaj ekde tiam ŝi ne plu havis kialon plendi pro lia sinteno, ĉar li plu vivadis, kondukante ĉiam tre malavare kaj grandanime.



Kristnasko: bilde kaj poezie 3^a Internacia Konkurso 2008

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **10^a de novembro 2008**, siajn verkojn al la jena adreso:

ESPERANTO TRIESTE - CP 601 Trieste Centro - IT-34132 TRIESTE - ITALIA

Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da verkoj, pri la supre indikita temo, en la kategorio:

- 1) desegnaĵo, maksimume unu A4-formata folio;
- 2) poeziaĵo.

La desegnaĵo havu komenton aŭ frazon en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

La poeziaĵo estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj: ➤ persona kaj familia nomoj; ➤ poŝta adreso; ➤ aĝo; ➤ lernejo kaj klaso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtor/in/o. Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko, dum la kristnaska periodo 2008. La vizitontoj kaj elektota ĵurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj. Ĉiu partopreninto ricevos partoprendiplomon; la premioj konsistas el libroj, KD-oj, kaj/aŭ ludoj depende de la aĝo.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Trieste, en fiksota dato.

Por kromaj detaloj/informoj: rete: noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.com Poŝte: vidu la supran adreson.

Triesto kasita **Apoteko Serravallo**

Kiu alteriĝas en la flug-haveno de Hong Kong, tute ne atendite povas esti altirata de granda ŝildo, blanka-nigra, reklamanta la firmaon *Serravallo*, “parenca” de tiu samnoma apoteko, ankoraŭ nuntempe funkcia en placo *Cavana*. Ĝi estis fondita en 1805 kaj en 1848 iĝis propraĵo de *Jacopo Serravallo*.

En la sama jaro li komencis la produktadon de vaste aprecata eliksiro, la KINKONA VINO FERRIÇA SERRAVALLO, aŭtentika panaceo por multaj generacioj. Ĝi estis perfekta por re-akirigi sanan apetiton, por doni ruĝetkoloron al paliĝanta haŭto, por kontraŭstari debilecon kaj tiujn tipajn malbonfartetojn kutime aperantajn je sezonsanĝiĝo. Niaj praavoj rakontadis pri ties miraklaj efikoj, kaj eĉ infanoj rajtis ĝin gustumeti, kiam la gepatroj, maltrankvilaj pro iliaj palaj vizaĝetoj, ekrimarkis ankaŭ daŭran perdon de ilia, kutime nesatebla, apetito. Bonkvalita produktaĵo, kiu bedaŭrinde estis destinita nur al eksterlando, ĉiulande altaprezata kaj preskaŭ nekonata surloke!

Unue oni komencis elfari tiun “dian likvaĵon” en la postbutiko, laŭ instrukcioj de tre antikva recepto, kies preskriboj ĉiam estis skrupule kaj zorgeme observataj, ĝis la jaro 1986. La sukceso de tiu eliksiro estis tiom grandioza, ke plej baldaŭ ne plu sufiĉis tiu metiiste produktata kvanto, por kontentigi la klientaron. La apoteko, de n-ro 3 en placo *Cavana*, translokiĝis al n-ro 9, dum oni decidis pli vastigi la laboratorion kaj komenci preskaŭ industriajn produktadon. Tiu-cele ĝi estis starigita en iu konstruaĵo de la Malnova Haveno, kie oni eklaboris respektante kaj tradicion kaj malnovajn labormetodojn, escepte de tiuj teknikaj renovigoj nepre necesaj: tio estis evidenta en la ekstera aspekto de la boteloj, ĉiu el ili havanta tiujn karakterizan formon kaj specialan etiketon, neniam ŝangitajn, ekde la koloro ĝis la grafika stilo...

De 1929 ĝis 1974 pri la firmao okupiĝis, senhalte kaj sindediĉe, *Elena Serravallo*. Post ŝi, daŭrigis la produktadon *Michele Luxardo*, ĝis la fino de oktobro 1986, kiam la produktado de tiu universala kuracilo ĉesis en Triesto.

Palaco Polifemo

En placo *Garibaldi*, iam placo de la *Stranga* (barilo), poste *Marina* kaj *Elisabetta*, staras impona konstruaĵo, sur kiu leviĝas friso. En ties centro staras vasta malplena rondaĵo. Pri tio ĉi pli poste mi rakontos, unue io direndas pri la origino de tiom da diversaj nomoj donitaj, dum la tempopaso, al la placo. La termino *Stranga* devenas de barilo, en la germana “*Schranke*”, ĉar en tiu proksimeco troviĝis la doganejo, do, sekve iu stango limiganta la akcizan linion; *Marina* (mara), ĉar tiuloke iam estis la kazerno de mar-armeaj fuzilieroj; *Elisabetta*, honore de la imperiestrino *Sissi*, okaze de ŝia unua veno al Triesto.

La domo, havanta tiun tiel okulfrapan “truegon”, estis konstruita en 1882 per la kapitaloj de la Banko *Union* el Vieno. Unue, en ĝi estus devinta havi sian sidejon la Ĉefkomandantaro de la Mar-armeo kaj poste la Banko mem, sed fine nenio el ĉio ĉi estis decidita. Post transformoj de la interno, la konstruaĵo iĝis domo por privata loĝado. Kaj tiu nedecidemo pri ties destino evidentiĝas en la nekompletigita skulptaĵo surtegmeta, ornamanta la ĉefan fasadon. En tiun grandan ŝtonrondaĵon oni pensis lokigi mirindan horloĝon, sed ... Triestanoj, kies sprita mokemo bone konatas, baptis tiun konstruaĵon per la kromnomo “Palaco *Polifemo*”, ĝuste pro tiu “frunta okulo” entute malplena!

Danĝero en aero!

Polaj pilotoj: malsufiĉaj iliaj scioj pri angla lingvo.

En *Heathrow* lastsekunde evitita kraŝo!

Pri la tro malmulta regado de la angla lingvo, fare de pluraj pilotoj, ĉefe polaj, sensacie parolis la brita ĵurnalo *Times Online*, emfazante la riskon ke konsiderinde pli-igis eraroj kaj akcidentoj en la internacia aertrafiko.

Iu *Boeing 737*, apartenanta al polaj aerlinioj, kun 95 pasaĝeroj plus deĵorskipo, preskaŭ koliziis kun alia aviadilo, ĉar estis miskomprenitaj la instrukcioj de la flug-kontrolistoj. La piloto ŝvebis super la flughaveno pli ol duonan horon, strebante rekoni la ĝustan alteriĝejon: fine li decidigis kaj suriĝis sur iu ajn kurejo, devigante la kontroliston tuturĝe liberigi tiun areon, jam okupitan de alia flugmaŝino.

“Ĉi akcidento – substrekas la *Times*-ĵurnalisto – evidentiĝas la danĝerecon de la fuŝa kono pri la angla de tiuj alilingvaj pilotoj, kiuj utiligas la servojn de la britaj flughavenoj. La angla estas la internacia lingvo de aviado, sed multaj landoj ja malrespektis la devigon, starigitan de ICAO (Internacia Organizo pri Civila Aviado), laŭ kiu oni devis certigi, plej laste ene de marto ĉijara, ke iliaj

pilotoj bone scipovu la anglan.” Pollando petis al ICAO prokraston ĝis marto 2011: post tiu dato kiuj ne elmontrus sian lingvan kompetentecon, ne plu flugos al internaciaj teritorioj.

Laŭ la laste ricevitaj donitaĵoj de ICAO, ĝis nun el la 800 polaj pilotoj, servantaj en internaciaj trafiklinioj, nur 15 pruvis sian kapablecon.

David Learmount, direktoro de *Flight International*, opinias, ke se - anstataŭ brita kontrolisto - estus tiam deĵorinta iu franco, angle parolanta, la situacio estus eĉ pli malbona. Plie, li substrekas sian profundan maltrankvilon, fronte al tiu inundo de novaj landoj, kiuj eniĝis en la internacian aertrafikon, sen disponi je pilotoj bone regantaj la anglan, kaj – li konkludas – por multaj el tiuj estas pli facile lerni stiradon de aviadilo ol la lingvon mem.

El la presagentejo *Disvastigo*, *Giorgio Bronzetti*

Okazas!

- *Amikino mia kara, via edzo estas ebrulo.*
- *De kie ja vi scias tion?*
- *Kiam ajn venante en la kafejon, mia edzo trovas lin tie.*



Konu vin mem!

(Unua parto)

Ĉu iufoje vi pensis konsulti psikoanaliziston por ĝisfunde esplori vian karakteron aŭ vi preferas ignori tiujn flankojn, kiuj verŝajne povus vin timigi?

Jen tute specifa testo, kiu, laŭ fakuloj, povus malfermi la vojon al finfina kompreno.

Prenu folion kaj surpaperigu la respondojn, tuj kiel vi ilin elpensas, spontane: vi trovos la testan rezulton sur la lasta paĝo de ĉi bulteno.

SITUACIOJ:

Vi estas trapaŝanta ege densan arbaron kaj subite vi vidas malnovan kabanon.

1) Kiel estas la pordo?

- malfermita
- fermita

Vi eniras la kabanon kaj vidas tablon...

2) Kian formon ĝi havas?

- ronda
- ovala
- kvadrata
- rektangula
- triangula

Sur la tablo staras vazo ... kun akvo.

3) Kiom da akvo enhavas la vazo?

La vazo estas

- plena
- duonplena
- malplena

4) El kio estas farita la vazo?

- vitro
- porcelano
- argilo
- plasto
- metalo
- ligno

Vi eliras el la kabano ... daŭrigas laŭ la pado. Fore vi ekvidas akvofalon ... tie subenfalas akvo ...

5) Kioma estas la akvorapideco?

Indiku ciferon de 0 ĝis 10: _____

Ion post la akvofalo, vi piedpremas surgrunde ion malmolan ... Vi rigardas suben: io orkolora tie brilas. Vi kliniĝas kaj prenas ... ĉeneton kun ŝlosiloj.

6) Kiom da ŝlosiloj pendas de la ĉeneto?

Indiku ciferon de 1 ĝis 10: _____

Vi iras kaj iras ... klopodante atingi la padfinon, for el la arbaro. Subite vi vidas kastelon.

7) Kia estas la kastelo?

- malnova
- nova

Vi eniras la kastelon kaj vidas malklaran akvoflakon en kiu juvelo brilas.

8) Ĉu vi prenas la juvelon?

- jes
- ne

Tiu ĉi estas la unua parto de la psikanaliza testo. Bv. pacienci ĝis la venonta Bulteno: tiam sekvos la dua parto, kune kun la fina analizo, tre interesa.



**Fermo de la asocia sidejo ekde la 1^a de julio ĝis la 4^a de septembro!
Programoj komenciĝos vendredon la 5^{an} de septembro 2008.**

**Sabaton, la 30^{an} de aŭgusto, ĉiuj ĉe Anita!
Detalajn informojn donos ĝustatempe nia tre ĝentila TEA-telefonistino Lida!**

Kadre de la alirprogramoj de **Radio UNO** kaj **Radio TSA**, estos preparolitaj la jenaj temoj:
14 julio - 14h00 - Radio UNO - Esperanto-eventoj en Triesto
5 aŭgusto - 12h45 - Radio TSA (slovenlingve) - Esperanto kaj Junularo
13 aŭgusto - 14h00 - Radio UNO - Eŭropa Unio: kiom da lingvoj, tiom da kulturoj
2 septembro - 12h45 - Radio TSA (slovenlingve) - Esperanto-eventoj en Triesto

La **17^{an} de julio**, je la **9h30**, ĉe RAI UNO, televida rubriko "**10 minutojn pri...**" enkadre de la alirprogramoj, Itala Esperantista Junularo, reprezentita de ĝiaj prezidanto Luca della Maddalena kaj kasistino Elina Koryak, parolos pri la temo: "Junularo strebe al superado de lingvaj baroj kaj konservado de kulturoj". La registraĵo restos je dispono rete, ankaŭ post la dissendo. Eblas aŭskulti kaj vidi la antaŭajn du ĉe la sekvaj retadreso: <http://tinyurl.com/3x7tlw> kaj <http://tinyurl.com/ywqk4g>. Oni rajtas ankaŭ eldiri propran opinion pri la sendaĵo. Eksploatu tiun ĉi eblon, kaj ne forgesu la rendevuon kun la televidilo!

Bongusta kokino Tio okazis en Usono. Tri judaj filoj forlasis la hejmon, eklaboris kaj post multaj jaroj ege riĉiĝis. Unu tagon ili renkontiĝis kaj interdecidis aĉeti donacojn al sia maljuna patrino. Diris la unua filo: "Mi donacos al ŝi grandan, luksan domon." La dua diris: "Mi donacos al ŝi luksan aŭtomobilon kun ŝoforo."

Diris la tria filo: "Mi donos al ŝi la plej bonan donacon. Vi scias, ke Panjo tre amas legi la Toraon, sed ne plu kapablas bone vidi. Mi aŭdis ke ekzistas granda papago, kiu scias parkere la tutan Toraon ("juda" papago...). Necesis 10 jaroj por ĝin instrui. Mi jam kontrolis kaj scias, ke mi devos pagi \$1,000,000 por jaro dum 20 jaroj por aĉeti ĝin, sed ĝi valoras la penon. Panjo nur devos diri la ĉapitron kaj la versiklon, kaj la papago tuj deklamos ĝin."

Post nelonge, Panjo sendis al la filoj dankleterojn.

Al la unua filo ŝi skribis: "Milton, la domo estas tro granda. Mi loĝas en unu ĉambro, sed devas purigi la tutan domon."

Al la dua filo ŝi skribis: "Marvin, mi estas tro maljuna por veturi. Mi restadas hejme kaj neniam uzas la aŭton."

Al la tria filo ŝi skribis: "Melvin, mia kara. Vi estas la nura filo, kiu havas la prudenton scii kion ŝatas via patrino. La kokino estis tre tre bongusta!"

Eripono Rabeno, kiu malfermis matene la alvenintajn poŝtaĵojn, trovis en unu koverto blankan paperfolion, sur kiu estis skribita nur unu vorto:

FRIPONO!

Vendredon vespere en la sinagogo, tuj post la Ŝabata parolado, li anoncis:

"Mi renkontis multfoje homojn, kiuj skribis leterojn sed forgesis subskribi ilin. Sed ĉi-semajne okazis al mi io tre interesa: mi ricevis leteron de iu, kiu subskribis sian nomon sed forgesis skribi la leteron mem..."

Enmigrado el Soveta Unio al la juda ŝtato En la 1970-aj jaroj en

Sovetunio Brejnjev, ĝenerala sekretario de la komunista partio, demandas al Kosigin, la ĉefministro:

- Ĉu estas multe da hebreoj en nia lando?

- Ĉirkaŭ tri-kvar milionoj.

- Se ni al ĉiuj permesos forveturi en Israelon, ĉu multaj ekvolos?

- Ĉirkaŭ dek-dekkvin milionoj.

Freud kaj la juda humoro

Enkonduko:

La germandevena vorto **Ŝnorer** est-

as ofte uzata en la jida lingvo. Ĝi signifas almozpetanton kaj ankaŭ homon, kiu gajnas monon, ne per laboro, sed per kolektado de mondonacoj ĉe riĉuloj.

Oni multe kritikis siatempe en Eŭropo tiujn judojn, kiuj "ŝnoreris", ĉu por si mem ĉu kiel delegitoj de diversaj judaj bonfaraj asocioj, religiaj studejoj ktp.

Sigmund Freud esploris la judan humuron. En sia libro "La ŝerco kaj ĝia rilato al la nekonscio" (*Der Witz und seine Beziehung zum Unbewußten*, 1905), li priskribas la psikologian aspekton de la judaj ŝercoj kaj eĉ prezentas kelkajn el ili. Inter alie li skribis:

"Mi ne scias, ĉu multaj estas la popoloj, kiuj tiom multe ŝercas pri si mem kiom faras la judoj".

Jen unu el la ŝercoj de li prezentitaj:

Ŝnoro

Juda ŝnoro petas de la barono monon por iri al la kuracbanejoj de Ostande, sekve de rekomendo de sia kuracisto.

Barono: "Sed Ostande estas tre multekosta loko. Ankaŭ pli malmultekosta loko sufiĉos por kuraci vin!"

Ŝnoro: "Sinjoro barono, por mia sano nenio estas tro multekosta."

(Fonto: la retlisto de amantoj de judaj humorajoj)

Jen la klarigoj pri la testo: **Konu vin mem!** (1^a parto)

1) La pordo:

Pordo malfermita: vi estas persono plezure kundividanta kun aliaj homoj propran vivon.

Pordo fermita: vi estas persono, kiu preferas serĉi solvojn en si mem.

2) La tablo:

Ronda/ovala: plene, vi akceptas ĉiujn amikojn alvenantajn.

Kvadrata/rektangula: vi estas malpli komunikema kaj akceptas nur tiujn kiuj, laŭŝajne, samopiniis kiel vi.

Triangula: vi tro postulas de viaj amikoj, tial, do, ĉirkaŭ vi da ili malmultaj estas.

3) La akvo en la vazo:

Vazo malplena: via vivo ne plene kontentigas vin.

Vazo duonplena: nur duone kontentiĝas viaj vivnecesoj.

Vazo plena: via vivo, laŭ vi, estas plene kontentiga kaj bela.

4) La vazmaterialo:

Vitro/porcelano/argilo: vi estas malfortkarakteraj kaj hezitema.

Metaloplasto/ligno: vi estas forta kaj vigla.

5) La akvofalo:

0 - vi entute ne emas al seksumado ...

de 1 ĝis 4 - ... malofte vi emas ...

5 - ... mezgrade ...

de 6 ĝis 9 - ... altgrade ...

10 - Senespera kazo!!! Eksterordinara emo!!! Ne eblas, por vi, vivi sen seksumado ...

6) La ŝlosiloj:

1 - dum via vivo vi havas unu bonan amikon.

De 2 al 5 - kelkajn bonajn amikojn dum via vivo vi havas.

De 6 al 10 - vi havas multajn bonajn amikojn.

7) La kastelo:

Malnova: via lasta amrilato estas nek feliĉa nek memoriginda.

Nova: via lasta amrilato estas feliĉa kaj ĉiam fajra en via koro.

8) La juvelo en la malklara akvoflako:

Jes - kiam via partnero al vi proksimas, vi emus koketi kun aliuloj.

Ne - kiam via partnero proksimas, vi emus resti kun li/ŝi kiel eble plej multe da tempo.

(fino de la unua parto)

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Eida DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via Coroneo 15 - Trieste - marde-vendrede 19-21 horoj
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; noredv@tele2.it
Grupa ftt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristiana
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste - Italio
Poŝtekkonto N° 10834349